



1971

numero 1

JEN BULTENO

*kvartanara esprimilo de la
Junularo Esperantista de Nordameriko*

LA REDAKTORA OFICO TRANSDANIĜIS

Ek de ĉi tiu jaro, nova redaktorado prizorgas la eldonadon de nia komuna esprimilo, la JEN-Bulteno. La eksredaktoro, Robert Rothenmeyer, petis malsarĝiĝon ja la redaktora ofico. La novaj redaktoroj kaj ĉiuj JEN-anoj deziras esprimi al li, kiu dum pluraj jaroj servadis kiel la redaktoro de nia gazeteto, niajn elkorajn dankojn pro la laboro, kiun li plenumis en la servado de JEN.

La novaj redaktoroj (cetere ankaŭ estraranoj de JEN) estas:

Erik Felker, 731 Birmingham Road, Burbank, CA 91504

Denis LeCam, Stevenson 1-113, Box 6, Univ. of Cal.,

Santa Cruz, CA 95060

Gary Mickle, 1519 Lemon Lane, Davis, CA 95616

Tiu lasta (kiu skribas ĉi tiujn liniojn) estas la nuna multobliganto kaj ekspedanto de J-B. Li petas la pardonon de la legantoj pro eventualaj teknikaj neperfektaĵoj ĉe ĉi tiu unua numero farita ĉe li. Ni ĉiuj petas de la legantaro subtenon per propraj verkaĵoj kaj leteraj reagoj, kiujn oni sendu al iu ajn redaktoro. Pli poste ni eble disdividos la redaktajn taskojn inter ni--ni sciigos la legantojn laŭe.

KANDIDATIĜU POR LA JEN-ESTRARO!

Jam venis la tempo rekomenci la proceson, per kiu elektiĝas la kvin estraranoj de JEN. La elektomanieron priskribas Ĉapitro V., "Elektado de estraranoj," de la Statuto. Jen la koncernaj paraĝrafoj de tiu ĉapitro:

"Ĉiujare elektiĝu Estraro laŭ la jena programo:

1. Antaŭ la unua de aprilo, la Estraro sciigu la membraron per la Bulteno pri la nombro de la sekvonta Estraro, kaj petu kandidatigojn.

2. Oficiala kandidato estu ĉiu persono por kiu kandidatigo, subskribita de almenaŭ du membroj, atingis la oficejon de JEN antaŭ la unua de majo. Ĉiu kandidatigo rajtu porti deklaron ne pli longan ol 100 vortoj.

3. Antaŭ la unua de junio, listo de oficialaj kandidatoj, ties deklaroj, kaj balotilo kun instrukcio pri balotado atingu ĉiun membron en la Bulteno."

La cetero de la ĉapitro priskribas la kalkuladon de la balotiloj.

JEN tre bezonas kandidatojn por la venonta Estraro. Lastjare estis malfacile trovi eĉ la ses kandidatojn por la kvin pozicioj. Almenaŭ du el la nunaj estraranoj ne povos rekandidatiĝi ĉi-jare. Sekve: se vi suface bone regas Esperanton kaj pretas oferi iomete da tempo por leter-skribado, kandidatiĝu! Vi servos JEN, konigante viajn ideojn pri nia estonta agado, kaj donante al la membraro pli da alternativoj.

ESPERANTO-ASOCIO KANDIDATIGITA POR PACPREMIO NOBEL

(IGS/739) Oslo. - Apud la federacia kanceliero de FR Germanujo, Willi Brandt, ankaŭ UEA estis ĵus kandidatigita por la Pacpremio Nobel. Inter la proponintoj de la Esperanto-Asocio, parlamentanoj kaj kleruloj el multaj landoj, elstaras grupo de 132 membroj de la Sveda Parlamento, konsistanta el membroj de ĉiuj svedaj politikaj

partioj. La proponintoj akcentas la rolon de internacia lingvo por pli bona internacia kompreniĝo.

Apud la 132 svedaj parlamentanoj troviĝas 14 membroj de la dana parlamento, same el ĉiuj partioj, kaj grupoj de parlamentanoj kaj aliaj kvalifikitaj personoj en Francujo, Italujo, Britujo, Norvegujo, Usono, Nederlando (37 parlamentanoj el kvin partioj) kaj aliaj landoj. Oni parolas pri la disvastigiteco kaj neceso de Esperanto.

Willi Brandt mem apogas Esperanton kaj skribis antaŭnelonge: "La lingva diverseco estas unu el la plej gravaj obstakloj sur la vojo al la interpopola amikeco kaj kompreniĝo. La internacia lingvo Esperanto jam delonge kaj sukcese klopodas forigi tiun barilon. La amikeca kompreniĝo inter la homoj de diversaj nacioj plifaciligas al la politiko, plenumi la grandan taskon: antaŭenigi la pacon."

APERIS LA PIV

Iuj legantoj eble ankoraŭ ne scias pri la eldoniĝo de la longe atendita Plena Ilustrita Vortaro. Tiu valorega verko aperis lastjare laŭ la kuraĝa iniciato de la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu siatempe eldonis ankaŭ la konatan Plenan Vortaron. Ĝia ĉefredaktoro estis Gaston Waringhien, la Prezidanto de la Akademio de Esperanto. La amplekso de la nova PIV necesigas sufiĉe altan prezon--proksimume \$25. Ĝi havas trioble pli da materialo ol la PV, kaj preskaŭ duoble pli da artikoloj (pli ol 15 000).

ĈILIO KONTRAŬAS UZON DE SATELITOJ

Limao (UPI) - La ĉilia Ministro de Klerigo, Mario Astorgo Gutiérrez, diris ke la registaro de lia lando malaprobas la ideon de kreado de satelito por disaŭdigi edukajn programojn en la anda regiono. Ĉilio opinias, ke la plano prezentas danĝeron de ideologia penetro.

* * * * *

Ĉi-sube ni publikigas leteron de la ukraina korespondanto de s-ro Paul Mimplitsch el Marlton, New Jersey, s-ro Danielo Kolker:

26/VIII-70

Kara Samideano!

Mi dankas al vi pro la letero kun pm (vi tamen ne mencias, ĉu la sendita de mi priesperanta filatelaĵo taŭgis kaj ĉu ĝenerale ĝi estis de vi ricevita). Ankaŭ mi dankas pro la luksa bildkarto el Kanado, hieraŭ ricevita.

Kiel mi vidas, vi usonanoj preferas pasigi feriojn ne nepre en sudo, sed jen norde. Nu, mi ankaŭ ĉi-somere veturis norden, al Ural-montaro (t.e. "limo" inter Azio kaj Eŭropo). Tie la 1-15an de aŭgusto okazis la tradicia 12a Tendaro de Soveta Esp. Junularo. Fakte la tendaro ĉi-foje estis ne en tendoj, sed en domo de vilaĝa lernejo. Entute partoprenis pli ol 150 esperantistoj, precipe gestudentoj, meza aĝo de la partoprenintoj egalas 22 jaroj. Kvar komencajn tagojn tie estis seminario de aktivuloj (de junulara E-movado) kaj poste komenciĝis la 10-taga komuna tendaro. En ties kadroj funkciis Somera Universitato (SU) kun sufiĉe kompetentaj prelegintoj: doktoro de fiziko-matem. sciencoj G. S. Ceitin,

letero de D. Kolker, daŭrigo

universitata profesoro de matematiko S. S. Kulikov, docento pri organika kemio B. V. Tokarev, ĵurnalisto V. Ĥarkovski, inĝeniero-radioteknikisto V. Ŝilas, lingvisto Boris Kolker k.a. Sufiĉas menciis nur kelkajn temojn de la prelegoj: "Esperanto en diversaj niveloj de maŝintraduko", "Pri Baŝkira lingvo" (La tendaro pasis en Baŝkira Aŭtonoma Respubliko), "Novaj esploroj en kosmo", "Instruado de Eo en lernejoj de Litovio", ktp. Dum prelego pri kosmo oni disdonis specialajn prospektojn "Luna Ŝtono", ruslingve presitajn en Usono.

Funkciis ankaŭ Pedagogia Seminario--pri novaj metodoj de E-instruado, kaj tri kursoj por progresintoj. Menciinda ankaŭ estas "libera tribunalo" kaj konkursoj pri arta recitado, pri tradukitaj kaj originalaj poeziaĵoj kaj "tradukista konkurso". Abundis ankaŭ distra programo: 4 koncertoj de plej fortaj regionaj kluboj--Centra Rusio, Ural-Volgo, Siberio kaj Ĉebaltio; komuna koncerto por lokaj loĝantoj, speciala "agitbrigado" por rikoltintoj, tradicia Neptuna Festo sur la bordo de la rivero Belaja, vespero de naskiĝtaguloj kun lerte organizita komuna interkizado, ĉiuvesperaj dancoj en ĉefa salono, du noktoj ĉe kampofajro, sportado, elekto de Miss Esperanto kaj Mister Esperanto, ekskursoj ktp ktp. Ni ankaŭ laboris--disŝarĝis karbon desur ŝipo, perlaborinte monon por la komuna kaso.

Pri la tendaro estis vasta informo pere de la loka kaj respublika gazetaro, radio. Dum la solenaj malfermo kaj fermo ĉeestis kaj elpaŝis lokaj partiaj kaj administrataj aŭtoritatuloj (kompreneble, en rusa lingvo). Generale, lingva nivelo de la tendaro estis tre alta, preskaŭ neniu krokodilis.

Mi jam menciis pri Baŝkirio. Baŝkiroj estas turklingva popolo, simila al tataroj. Antaŭe ili nenion semis, nur bredadis ŝafojn kaj ĉevalojn. Sed nun ili semas tritikon, sukerbeton, plantas ĝardenojn, eĉ kreskigas tiel norde vinberojn. Krome, nun Baŝkirio ekhavis fortan industrion, ĝi estas nun plej riĉa naftoproduktejo

Venezio

Ĉu iu potenco magia
invadis mallarĝan strateton
flugilojn svingante ebria
sur bordoj kaŝantaj sekretojn?

La plaŭdo de l'ondoj ne ĉesis
sur pontoj, pordegoj, kanaloj -
kaj ĉarm' de l'gondoloj karesis
belecon de ĉiuj analoj...

Radioj de l'sunflamo vekis
la ondojn dormemajn ĉe l'bordo.
Radioj per orlumo strekis
grandecon de l'urba famsorto...

Strateto kaj domo, preĝejo
aŭ plac' - ĉiu lavis sin vere
en sia spegula akvejo
ja kvazaŭ knabinoj fieraj!

La sunfajro al Marko-placo
sendadis brilantan honoron
kaj el bazilika surfaco
ĝi gvidis la lumĝojn oran.

Ĉi tie, la helaj koloroj
de l'skulptartoj kaj de l'statuoj
turniĝas en danco adora
de ĉiuj kolomboj, tiel bruaj.

...Kaj tiun potencon magian
nun povus diveni neniu.
Sonoras ĝi en sonĝo mia
Lumigas animojn hodiaŭ!...

Lila Wysinska

* * * * *

kaj naftokondukiloj de tie etendiĝas eĉ ĝis Pollando kaj Germanujo. Ĉefa urbo de la respubliko nomiĝas Ufà kaj havas preskaŭ milionon da loĝantoj. Ĝi situas sur la bordo de la rivero Belaja, sur montetoj. Plej vizitinda loko tie estas monumento de la Baŝkira nacia heroo Salavat--onidire, la plej granda laŭ mezuro ĉevalstatuo en la lando kaj dua en la mondo. La baŝkira lingvo estas tre belsona, ekzemple la rivero Belaja en Baŝk-lingvo estas "Agidèl" ("blanka akvo"). Do mi gustumis en kafeo "Agidel" specialan trinkaĵon "Agidel" kaj aĉetis plej luksan elektrorazilon "Agidel". Sed plej fama tiea trinkaĵo--aŭ, pli vere, drinkaĵo--estas kumiso, t.e. ĉevalina acidlakto, tre utila por sano kaj humoro: post du kruĉoj oni jam emas kanti.

Nu, jen ĉio. Se vi povas, bv. transsendi ĉi-leteron al iu usona E-Revuo por ke oni eltiru el ĝi taŭgan informaĵon, ja eble usonaj esperantistoj tre nebule scias pri junulara E-movado en Sovetio.

I.a., sekvanta simila tendaro estos en Kievo (apud Kievo), kaj se iuj junaj usonaj geesperantistoj propraforte atingos en aŭgusto 1971 Kievon, ili ricevos dum duonmonato tie preskaŭ senpagan loĝadon kaj tre malkaran manĝadon, senpagajn ekskursojn tra Kievo, ktp. Pasintjare samideanino Kalrsson [tiele] el Svedujo kun sia usona amiko tre facile atingis Kievon kaj Lvovon, do tio estas reala afero. Oni nur devas veni indivue, ĉar specialaj (oficialaj) invitiloj jam estas elĉerpitaj de la organiza komitato--por hungaroj, poloj, kaj bulgaroj. Mi tre ĝojos, se vi sukcesos diskonigi ĉi-informaĵon en usona kaj kanada E-gazetaro, eble en Kievo estos usonaj s-anoj!

Nun mi sendas al vi ankoraŭ unu filatelaĵon pri E. kaj antaŭdankas vin pro pm-j.

Salutojn al viaj familianoj,

Danielo

PS. Antaŭ unu semajno mia edzino naskis filinon, ni ŝin nomos Larisa. Tio estas mia plej ĉefa privata novaĵo.

Skribanto: S-ro Danielo Kolker D.
Str. S-Kolcevaja 20-149
Zaporojje-58, Ukrainio, Sovetunio

Ni dankas s-ron Kolker pro lia deziro sciigi la usonan samideanaron pri la aktivecoj de la junaj esperantistoj de Sovetio, kaj s-ron Mimlitsch pro la plusendo de lia tre informriĉa letero.

* * * * *

Verŝajne, lingvaj problemoj ekzistas ne nur inter la homoj, sed ankaŭ inter la homoj kaj la bestoj. Jen parto de artikolo kiu aperis en ABC, grava ĵurnalo de Madrido: "Al Fernando Garcia, el Madrido, oni donis tempoperiodon de ses monatoj por ke li instruu al sia papago ke ĝi ne uzu kelkajn fivortojn. Se post tiu periodo la lingvaĵo de la papago ankoraŭ ne taŭgos por severmoruloj, oni devos mortigi la birdon."

DEZIRAS KORESPONDI

Brazilo

grupo da ĝelernantoj (12- ĝis 27-jaraj), ĵus finintaj kurson en Natal, dez. kor. kun Usonanoj. Skribu al S-ro Jorge Carlos Pereira Felipe, Rua Belo Monte, No. 561, Rocas-Natal-R.N.-Brazilo, aŭ al la estrino de la Koresponda Servo de JEN, F-ino Ellen Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Mass. 02146, kiu povas detale informi pri la nomoj, adresoj, aĝoj kaj seksoj de la 12 ĝelernantoj.

dez. kor. kun junaj f-inoj pri diskoj, ktp.: José Luis Fernandes Lage (aĝo nelegebla), Rua Benjamim Constant 49-f.-Bloco 3, Apt. 303, Niterói, Rio de Janeiro, Brazilo. Dez. interŝanĝi muzikdiskojn kaj bildkartojn kun usonaj fraŭlinoj.

dez. korespondamikino: studento de la tria jaro de la Fakultato de Veterinararto. Interesiĝas pri revuoj pri bestkulturado. Filatelisto. Interŝ. pm. k bk. Angle, france, itale, hispane, germane, portugale. S-ro Antonio Wilmário Rolim, Av. Felino Barroso 810--Bairro Fátima, Fortaleza, Ceará, Brazilo

S-ro José Dos Santos Simas, Rua Alto Purus 7-28, Bauru, S. P., Brazilo. Ankaŭ havas esp. ĝeamikojn, kiuj dez. kor.

Bulgario

S-ro Dim. Novokov, S. Batiŝnica, Rusenko, Bulgario

Ĉeĥoslovakio

S-ro Antonín Vavrouš, Libuš 301, Praha 4, Ĉeĥ., bk., ktp.

F-ino Dagmar Mlejnková, Vzahradách 98, Jaroměř IV, Ĉeĥ.: dez. kor. pri antaŭlernejaj edukejoj por ĝeinfanoj. Ankaŭ ŝatas muzikon.

Francujo

S-ro Patrick Delalaing, 23 Bis Rue de Toul, 62, Calais, Francujo. 18-jara, dez. kor. kun samaĝaj usonaj fraŭlinoj

ĈU INTERNA CIA MONSISTEMO?

Tim (Tiĉjo) Fallis

En la nuna mondo ni havas plurajn internaciajn sistemojn, kiuj helpas plibonigi la internacian komunikadon. Ni havas la interlingvon Esperanto; tio ne bezonas priskribon ĉi tie. Ni havas la bonegan metran sistemon, kiu normigas ĉiajn mezurojn en preskaŭ ĉiuj landoj. Sed bedaŭrinde la kreantoj de la metra sistemo ne decidis enhavigi en la sistemo universalan unuon monan, parte ĉar ne estis ega bezono ti-amkaj parte ĉar neniu lando kredeble akceptus tian aferon, ĉar oni ĝenerale ligis monon, kiel ankaŭ lingvon, kun naciismo.

Sed nun estas alie. Ki-ajn problemegojn ni havas en komercaj rilatoj inter diversaj nacioj, kiuj havas diversajn monsystemojn! La konfuzaĵoj estas teruraj kaj malprofitigaj. Preskaŭ ĉiam en la interlanda komerco, aŭ unu aŭ la alia partio gajnas aŭ malgajnas nur pro la diferenco de valoroj. Kaj vere la kurzoj konstante ŝanĝiĝas.

Mi do proponas, ke ni instigu tian monsystemon tutmondan. Oni jam antaŭe provis la aferon per la monunuo "stelo", sed nun oni ne multe uzas ĝin. Mi proponas, ke ni esperantistoj reinstigu ĝian uzadon, ne nur en esperantaj aferoj, sed kiel novan sistemeron de la metra. La stelo, se mi korekte memoras, valoras sep usonajn cendojn. Por pli grandaj kvantoj de mono, oni uzu la metrajn afiksojn "hekto-", "kilo-" ktp. Por pli malgrandaj, kompreneble, oni uzu "centi-", "mili-" ktp. Ekzemple, estas 14,3

Germanujo

S-ro Nikola D. Gjurnew, Perleburg-291,
Wittenbergerstr. 75, GDR (Orienta)

Gerhard Weintz (12-jara), D-6730
Neustadt (Weinstr.), Stettiner-Str. 26,
FRG (Okc.): skolto, dez. kor. kunusonanoj

S-ro Heinrich Bense, DDR 6081--Rotterode,
Obere Strasse 1, Germanio (Or.):
70-jara filatelisto

Koreo

S-ro Jeong Jong-Hyu (19-jara), P.O. Box
106, Gwangju, S. Koreo. Ĉiaspecajn
esperantaĵojn por la Stelo-Amika Klubo.

Pollando

S-ro Waldemar ("Valdek") Grupa (16-jara)
Bydgoszcz, Ul. Wiatrakowa 2/4, Pollando

Sovetunio

Rita Vidugirite kaj Nijola Zambaite,
Liepyno 16-6, Vilnius-34, Litovio, USSR.
Dez. kor. esp-e kaj (aŭ) litove gejun-
uloj. Se vi konas iun litovon, bv.
atentigi lin pri Rita kaj Nijola. (16-j.)

S-ro Algimantas Pijus ("Algis")
Vizgirdas (29-jara), P.O. 167, Klaipeda,
Litovio (Lithuania), USSR: gvidas
E-grupon.

"23-jaraĝa komencantino, studentino de
kemia fakultato dez. kor. precipe kun
fraŭloj el Usono, Kanado, Suda Ameriko
k Japanujo. Ŝian nepran kaj ĉiaman
respondon garantias ŝia edzo--Esp.

poeto Danielo Kolker. Adreso: Ljuba Kolker, S-Kolcevaja 20-149
Zaporoĵje (Zaporozhe) 58, Ukraino, USSR. Validas ĉiam.

Ĉu Internacia Monsistemo? daŭr.

steloj en usona dolaro, 3,9
en germana marko, 4,0 en
nederlanda guldeno, 34,6 en
brita pundo, ktp. Riĉulo
povas paroli pri siaj kilo-
steloj kaj megasteloj. Ero
de polvo eble kostas nur
kelkajn milistelojn.

Mi kredas, ke tio ĉi es-
tus bonega aldono al la me-
tra sistemo de mezuroj.
Kompreneble oni ne nomus ĝin
same en ĉiuj lingvoj; la
unuoj estus "kilostelos" en
la angla kaj germana, "chi-
losteli" en la itala kaj
eble "kilosteles" en la
franca, sed ankaŭ estas same
ĉe la ekzistantaj mezuroj
en tiu sistemo.

Mi esperas, ke la legan-
toj de ĉi tiu gazeto konsen-
tas kun mi pri la ideo de
internacia monsistemo kaj
pri ĝi skribos al la Inter-
nacia Oficejo de Pezoj kaj
Mezurojen Sèvres, Francujo,
kaj mencios ĝin en esperan-
taj kluboj. Se la nacioj
de la mondo povos interkon-
senti pri mono, ankaŭ Espe-
ranto ja havos grandegan
ŝancon por oficiala akcepto.

* * * * *

La Junulara Esperanto-Klubo de la urbo Kragujevac, Jugoslavio,
havas okazon aperigi en studenta gazeto artikolojn de junaj Esper-
antistoj tra la tuta mondo. Ĝi serĉas gejunulojn, kiuj volus verki
artikolojn pri temoj ligitaj al sia urbo, regiono, aŭ lando, kiuj
estus interesaj por jugoslava gelegantaro.

La artikolo ampleksu maksimume (sed ne tro malpli ol) kvar
tajpitaj paĝoj, kun granda interspaco. Oni interkonsentu antaŭe kun
la redaktoro pri la temo de la artikolo, almenaŭ por la unua
artikolo. Oni ankaŭ sendu la foton por aperigo kun la artikolo.

Interesatoj skribu al J. Arandeloni, Beograd, D. Dalienia
18/9, Jugoslavio; aŭ al La Propaganda Servo de la Studenta
Esperanto-Klubo, Kragujevac, p. f. 120, Jugoslavio.

* * * * *

La venonta numero (espereble) aperos post proksimume unu monato.

Güakamolo--Meksika Bongustaĵo por Usonaj Tabloj de Erik Felker

Kiu loĝas en la sudokcidenta parto de Usono, tiu konas la bongustegan kaj ekzotikan kuirarton de nia najbara lando, Meksiko. Kvankam multaj eroj de la meksika kuirado malfacile fareblas de geusonanoj, mi ĝojas prezenti unu, kiu ne nur estas facila, sed ankaŭ tre diversutila en la usona kuirejo. Ĝia nomo: güakamolo (hispanlingve: guacamole).

Güakamolo

- 1 grandan, plene maturan avokadon
- 1 servokuleron da suko de limedo aŭ citrono
- 1 servokuleron da haketita cepo
- salon
- kelkajn gutojn da kapsika saŭco, laŭdezire
- acidigitan kremon laŭplaĉe por forpreni la iomete olean guston de la avokado kaj malpezigi la miksaĵon.

Metodo: Senŝeligu kaj senkernigu la avokadon kaj plene kaĉigu ĝin, aldonante la sukron de la limedo aŭ citrono. Aldonu la aliajn ingrediencojn kaj miksu. Fridigu por plej bona gusto.

Uzoj:

Ŝmiraĵo Ŝmiru güakamolon sur rostpano por manĝi kun supo. Bongustas pecetigita lardo en la miksaĵo. Oni povas ankaŭ uzi güakamolon kiel ingrediencon de sandviĉo (ekz. de meleagro).

Trempsaŭco Uzu güakamolon kiel trempsaŭcon por krakenoj, salikoketoj, tomatopecoj, ktp.

Saŭco Ege bonas kiel saŭco por fiŝaĵo, kortbirdaĵo, aŭ bovaĵo, aŭ por legomsalato.

Redakcio, JEN-Bulteno
ĉe Gary Mickle
1519 Lemon Lane
Davis, CA 95616
U.S.A.

$s+v = e+2$

FIRST CLASS

$e = \frac{sn}{2}$

$s+v = \frac{sn}{2} + 2$

SUBTENU LA MOVADON:

LOKE,
NACIE,
MONDE!

$s(2-n) =$

$2(2-v)$

ADDRESS CORRECTION REQUESTED

UNIVERSALA ESPERANTINIU-ADUUVU
ARMIN DONEIS, ĈEFDELEGITO USONA
P.O. BOX 105, PHARR, TEXAS, 78574